

Novajoj Tamtamas

Internacia Gazeto de Jokohama Esperanto-Rondo (JER, Hama-Rondo)

Feliĉan kaj fruktodonan jaron 2011 !

Ĉe la sojlo de la nova jaro mi elkore salutas vin. Ne nur en Japanio sed ankaŭ en la mondo kuŝas multaj malfacilaĵoj. Konfliktoj inter homoj suferigas pacamantojn. Ni tamen antaŭen iru kun espero protektante la veran sencon de la vorto "esperantisto". Ni lernu kaj altigu nian kapablon de Esperanto : ni ĝuu la mondon de Esperanto. Pri la rimedo kiel disvastigi Esperanton mi ne havas utilan sugeston. Se vi havas bonan ideon, bonvolu sciigi ĝin al ni, kaj ni interŝanĝu opiniojn.

Ĉiuokaze nova jaro ĉiam donas freŝan senton de ĝojo. Mi provis esprimi tian senton en hajko. Mi estus feliĉa se la hajko plaĉus al vi.

Venis novjaro

kun leporo saltanta

brilas neĝkampo

(ĉi-jare estas la jaro de leporo laŭ la antikva orienta kalendaro)

AIDA Yayoi

NIAJ PLANOJ

ĈE LA REGULA KUNVENEJO

nome ĉe Kanagawa-Kenmin Sentaa (=Centro por la gubernianoj de Kanagawa), ĉirkaŭ la Stacidomo Yokohama.

*Regulaj Klasoj

Ĉiusabate posttagmeze estas la enkonduka/daŭriga kurso, mezaj klasoj 1,2 kaj 3, Jokohama Salono. Ĉiumerkrede posttagmeze estas la meza klaso. Pri detalo, kontaktu nin. (La unua klaso en 2011 okazis en la 8a de januaro).

*Komuna Lernado: jan. 22 (sab),
16h30-17h00, ĉambro 705.

*Hamaronda Vespero: jan.22 (sab),
17h00-19h00, ĉambro 705.

Estos antaŭdiskuto por la Ĝenerala Jarkunveno.

*Ĝenerala Jarkunveno de Jokohama Esperanto-Rondo: jan 29 (sab), 15h00-17h00, ĉambro 604.

La plej supera decid-organo de nia rondo, en kiu oni resumos la agadon kaj financon de 2010, kaj decidos la agadon kaj financon de 2011.

PRELEGO AL URBANOJ DE JOKOHAMO

Okaze de la prelegserioj de 'Internacia Forumo de Jokohamo', ni havos ŝancon prezenti Esperanton al la urbanoj. S-ro SUZUKI Keiĉiroo parolos japanlingve kun la temo "Buntan Internacian Interfluon pere de Esperanto".
tempo: feb. 11 (ven., ferio) 13h00-13h50
loko: 3-a Seminariejo de Yokohama-Kokusai-Sentaa de JICA

■ Eldonas Aida Yayoi ■ redaktas la organa fako de JER: Miyazaki Hideko

■ Poŝtadreso: n-ro 85 CPO, Yokohama, Japanio (JP-220-8691) ■ Telekopio: +81-45-785-5458

■ Retadreso: hamarondo@yahoo.co.jp ■ TTT-ejo: <http://www.hamarondo.org>

■ Abono: jare 1500 enoj, aŭ 10 eŭroj ■ uea-konto: jokr-j (Jokohama Esperanto-Rondo)



ESEOJ

Insuloj ĉirkaŭ Amakusa

Mizro Iwaya

Mi jam vizitis la urbon Nagasako dufoje. Fakte ĝi ĉarmas nin kun tradicia heredaĵo. Sed jam sufiĉas la urbopromenado mem. Nu ĉifoje mi kaj mia edzino elektis la maron. Post nia muzika prezentado en la Japana Kongreso, ni tuj iris aŭte al la orienta parto de Nagasako, Unzen k.a., kaj transveturis al la Insulo Amakusa.

Nia unua trovaĵo estis ties alta turisma kvalito kaj ekonomia prezo. La hotelo estis vasta kaj bela. La vasteco estis pli ol duobla de tiu en Nagasako, kvankam la kotizo estis proksimume sama. Ankaŭ ties ĉirkaŭaĵo abundis je natura riĉaĵo: la maro, arbaro kaj ĝardeno. Unu alia misteraĵo estis la fakto ke gastoj ne multis malgraŭ ĝia kvalito. Tiuj ĉiuj certe devenas de malgranda kapacito de la amakusa ekonomio. La lokado estas tiel grava por entreprenistoj. Sed tia tendenco estas opornuna por ni, kapricaj turistoj. (Fakte nia vizit-tago estis tuj post la sinsekvaj ferioj.)

Ni unue spektis la maron. Mi ne scias kial, sed fakte la insulo Kjuŝu abundas je malgrandaj insuloj ĉirkaŭ si. Mi scias ke ankaŭ la Interna Maro de Seto havas multe da insuloj, sed ili estas kutimaj plataj insuloj. Dume la insulo Amakusa, granda kaj plata insulo en Kjusju, estas akompanata de diversaj malgrandaj, ofte ne priloĝataj kaj belformaj insuloj. Ilia formo estas unika. Ili staras en la maro kvazaŭ fungoj. Certe longjara maronda erozio faris la fundan parton akute stari el la maro. Al tio rilatas ankaŭ ofta erupcio de vulkanoj. La lafo konsistas ĉefe el mola tertavolo. Kiam ĝi ŝprucas kaj akumuligas sur iu marfundo, ĝia enaera parto restas longe kaj enakva parto rapide foreroziigas. La rezulto estas fungoforma insulo, kies aro prezentas pitoreskan pejzaĝon.

Natura dinamiko regalas nin pli ol artefarita plezurejo.

Kio estis amuz-parko 'Kagetuen' en Jokohamo?

SIBAYAMA Zyun'iti

Historie, la 3a Kongreso de Japana Esperantista Asocio okazis en Tokio, la 29an de aprilo, 1916. La sekvintan tagon iuj el ili ekskursis al 'Kagetuen' (花月園: laŭlitere; Flor-Luna Ĝardeno) en *Turumi* (鶴見), Jokohamo, kredeble per tramo de la Elektro-Fervojo *Keihin* (nuna *Keikyu*) ĝis la stacidomo 'Kagetuen-mae' (Ĉe Kagetuen), kiu ankaŭ nun estas. La samo estis ripetita por la 4a kaj la 5a Kongreso, kaj ankaŭ en la 6a Kongreso en 1919, kiu okazis en Jokohamo mem. Sed nun tiu ĝardeno ne estas. Do kio ĝi estis?

Proksime al la maro, estis/as Templo *Turumi-Soozizi* en alteco de 30 metroj de la maro. De tie estis deklivo kaj plataĵo en alteco je 20 metroj, vasta je ĉirkaŭ 80 000 kvadrataj metroj. Tiu areo fariĝis en 1914, 'Kagetuen'. Ĝi estis ĝardeno, kies modelo estas ĝardeno en *Fontainbleau* [fontenblo'] apud Parizo, en Francio. Tie estis zoologia ĝardeno, subĉielaj ludiloj, tenisejo, kaj ankaŭ restoracioj kaj haloj. Kredeble esperantistoj havis bankedon en unu el tiaj haloj. La loko estus kvazaŭ hodiaŭa lando je *Disney* [dizni].

En la 1930aj jaroj, tiu *Kagetuen* estis venkita de aliaj pli grandaskalaj ludejoj, i.a. en Kawasaki, kaj unu fojon bankrotis, sed la Fervoja kompanio daŭrigis teni almenaŭ la funkcion de ludparko por pluraj jaroj.

En 1950, la postlasita ludejo fariĝis vetkurejo de biciklado, kaj tiel restadis, sed tiu vetkurejo estis finfine fermita en marto, 2010 pro akumulita defecito. Ankoraŭ ne decidite estas kiel fari la postlasitan terenon.

(Literaturo pri la Japana Kongreso, japanlingve en *Hatusiba*; "Historio de la Japana Esperanto-Movado", JEI, 1998.)



S-ro Noss

Murata Kazuyo

Mi volas prezenti s-ron Christoph NOSS, kiu estis gasto de Zamenhof Festo de TEK (Tokia Esperanto-Klubo). Verŝajne vi scias, ke lia edzino estas s-ino Hirata Akiko, kiu estis eksa kursgvidanto de TEK.

Li estas germano, lia patro estas lernejestro de germana lingvo en Italio.

Li loĝas en la urbo Munkeno kaj laboras en la urba oficejo, lia fako estas Socia Bonfarto. Li okupiĝas pri administrado pri mon-afero de maljunuloj, kiuj bezonas oficialan helpon. Ekzemple iu maljunulo jam ricevas difinitan monon de la urba buĝeto ĉiumonate. Sed se la lupago de lia loĝejo altiĝas, oni devas multigi la monon.

En la urbo relative multaj maljunuloj loĝas, 26% da loĝantoj estas pli ol 65 jaraĝaj. (En Japanio la averaĝo estas 22% da maljunulo.)

Mi ne povis demandi pli detale, ĉu la monsumo estas granda aŭ ne kompare kun Japanio.

Ĉar mi laboras kiel hejmhelpanto, kiun ŝtata sistemo servas, mi havas intereson pri tiu afero. Li diris, ke ankaŭ en Munkeno troviĝas simila servo.

Sciante, ke li vizitis Japanion dum du monatoj, mi miris ĉu la urba oficejo permesas tion. Laŭ lia klarigo, en la urbo Munkeno la situacio similas al nuna Japanio. Malmultiĝas nasko de bebo, pro tio oni subtenas junajn gepatrojn faciligi naski bebon.

Li ricevis oficialan ferion 2-monatan, kun du

trionoj da salajro. (Ĝis 1 jaro li povas ricevi la specialan ferion por subteni gepatrojn.)

Krome lia edzino Akiko ricevas mon-donacon de 300 eŭroj monate, dum ŝi ne povas labori ekstere.

Antaŭ 11 jaroj li eksciis pri Esperanto pere de ŝatata kanto, kies titolo estas Esperanto, kaj memlernis per kurso en komputilo. Li unuafoje vizitis Japanion okaze de la UK en Yokohama.

Li parolis pri Esperanta Urbo Herzberg uzante multajn fotojn, ĉar venontjare okazos UK en Kopenhago kaj la postkongreso de TEK-karavano vizitos tie.

Kiam mi aŭdis la nomon Munkeno, mi tuj rememoris pri "Lernejo de Ŝteiner", kaj demandis pri tio. Lia respondo surprizis min.

Li havas du fratinojn. Unu el ili laboras kiel natur-kuracisto (Tio signifas, ke ŝi uzas herbojn, mineralojn kaj eĉ oron anstataŭ kemiajn medikamentojn. Ŝi studis ne nur modernan medicinon sed ankaŭ germanan tradician manieron de kuracado). Kiam ŝi estis lernanto ŝi lernis en la speciala lernejo, nomata "Lernejo de Ŝteiner", fondita de Rudolf Steiner. Antaŭlonge mi havis intereson pri la lernejo tre unika, pro tio mi demandis pri diferenco inter ordinara lernejo kaj ĝi. Laŭ lia klarigo la lernejo celas eduki lernanton kiel totalan homon, havantan ne nur scion sed ankaŭ arton. Poste mi mem serĉis la informon pri la lernejo pere de interreto. Kaj eksciis, ke la lernejo estas tre bona, sed neniel en Japanio oni povas imiti la edukadon, laŭ mia supozo...

Raporto pri la 81-a legkunveno

La 81-a legkunveno de Hama-Rondo okazis la 4-an de decembro, 2010. La traktita libro estis "Silento" originale verkita de Endoo Ŝusaku, fame konata katolika literaturisto en Japanio, kaj esperantigita de Doi Ĉieko, redaktoro de la Revuo Orienta kaj ano de Hama-Rondo. La libro estis publikigita kiel memoraĵo de ĉi-jara Japana Kongreso de Nagasako.

8 personoj kolektiĝis kaj interŝanĝis opiniojn pri diversaj temoj ekz. pri kredado, martiriĝo, konvertiĝo, torturo, k.a. La romano enhavas terurajn scenojn, kiuj ŝokas kaj doloras legantojn.

En la kunveno estis diskutitaj kun analizo de la rakonto ankaŭ prohibicio de kristanismo en japana historio. Entute tre stimul-riĉa kunveno. Vi povas legi detalajn raportojn de la partoprenintoj sur La Tamtamo, nia japanlingva organo.

En Hama-Rondo okazas 4 legokunvenoj ĉiujare. En la venonta jaro okazos la unua en marto. Ni legos la novelojn "Ruĝa Kokono", verkita de ABE Kōbō, tradukita de HAYASI Kenn. Ni atendos vian partoprenon.

(Aida Yayoi)

BELETRO

Orienta violono de Minoru (Parto 1)

verkis Satoo Haruo

tradukis AIDA Kiyoshi

La familio de Minoru estas la malproksima parenco de mia patrino flanko. Post kiam la patro de Minoru malsukcesis en sia enterpreno, li venis ĉi tien de trans la maro por akcepti la helpon de mia patro. Kaj li fariĝis librotenisto ĉe la hospitalo de mia patro. Sed la gefratoj de Minoru, pli maljuna fratino kaj du junaj fratoj, estis tre malfeliĉaj, ĉar iliaj gepatroj sinsekve mortis neatendite. Minoru kaj liaj gefratoj ne havis parencojn kaj pro tio mia patro subtenis ilin.

Kiam Minoru fariĝis 15-aŭ 16-jara, mi probable estis 7-jara. Minoru komencis diri, ke li volas iri al Usono. Tiutempe multaj homoj en mia hejmloko volis iri al Usono por labori. Eble eĉ nun en mia hejmloko la nombro de elmigrantaj laboristoj okupas la unuan aŭ la duan lokon en Japanio. Kiam Minoru diris, ke li volis iri al Usono, la tutaj familianoj persvadis lin ne forlasi la urbon, ĉar la lando estis tro fora por la knabo kiel li. Sed Minoru neniel akceptis la konsilon. Poste mia patrino ofte diris al mi pri ĉi tiu afero, "Li ne volonte iris al fora lando; li ne volis akcepti prizorgadon de nia familio por kvar gefratoj inkluzive lin. Kompare kun ili vi estas feliĉulo."

Mia patro donis uzitan vestaĵon al Minoru, kiu poste retajloris ĝin. En la tago de ekveturo de Minoru mia familio kune akompanis lin al la tombo de la patro de Minoru situanta rande de la urbo. Mi ne bone memoris la tempon ĉu en printempo aŭ en aŭtuno. Mi ne forgesis, ke mi piediris malrapide ol aliaj familianoj plukante apudvojn herboploj.

Minoru sendis al ni dolĉaĵon skribante, ke li jam alvenis al Usono. Ĝi estis nigraĵo kovrita de arĝentkolora papero. Kiam ni manĝis ĝin, ni trovis, ke la interno de la dolĉaĵo estis blanka kaj estis ne nur tro dolĉa, sed ankaŭ malbonĝusta. Ĝi estis ĉokolada kremo. Tio estis antaŭ 25 jaroj. Ĝis tiam en nia vilaĝeto neniu vidis aŭ gustumis

ĝin. La vojaĝo mem estis dekomence malfeliĉa por Minoru.

Mia patro rekomendis lin ekveturi per ŝipo de la haveno de Koobe. Se Minoru ekveturus de Koobe, Minoru havus kunveturanton. Sed li elektis ekveturi de Jokohamo, ĉar li verŝajne volis viziti Tokio-n antaŭ ol iri al Usono. Malfeliĉe tuj post de lia ekveturo propagiĝis ĥolero en Jokohamo. Kiam la ŝipo de Minoru alvenis al San-Francisko, surlandiĝo de homoj el Koobe estis tuj permesita, sed tiuj el Jokohamo devis restadi en la ŝipo du monatojn. Minoru apartenis al la lastaj kaj pro tio li ne povis eniri en la havenurbon. (Daŭrigota)

Pri la aŭtoro Satoo Haruo

Satoo Haruo (1892~1964) naskiĝis en la urbo Ŝinguu de la gubernio Ŭakajama. Li estis poeto, novelisto kaj kritikisto de la fino de la erao Meiji (1868~1912) ĝis la komenco de la erao Ŝooŭa (1926~1989). Dum li estis studento de Keioo-Universitato, li kontribuis siajn verkojn al la gazetoj de Mjooĵoo, Subaru kaj aliaj. Li gajnis famon kiel verkisto pro la verko de "Melankolio de kamparo" (1916). Li edziĝis al la eksa edzino de la fama verkisto Tanizaki Ĵun'ičiroo. Post la Dua Mondmilito li aktivis en diversaj kampoj de literaturo kaj liaj ĉefaj verkoj estas "Perspektivo pri moderna literaturo en Japanio" (1950), "Akiko mandalo" (1954), kaj "Venis el paradizo" (1960). En 1960 li akiris la Ordenon pro Kultura Merito.

(AIDA Kiyoshi)

Redaktanto salutas



De tiu ĉi numero mi enpaĝigas. Dekomence pro reta akcidento mi malfrue ricevis manuskriptojn. Plie ĉar mi estas mallerta je tiu ĉi enpaĝiga programo, mi devis senĉese konsulti ŝloslibron. Ĝuu nian gazeton!